

Priholokaŭsta literaturo:

EKREKONVALESKO POST LA ŜOKTERAPIO

Pri la varia percepto de la kritiko de Jan Tomasz Gross

La tuta mondo scias, nur en Pollando oni ne ŝatas paroli prie: ke en siaj propraj vicoj la katolika eklezio evidente mem havas drastan problemon kun la antisemitismo. La publikigo de la libro *Timo* (angle Fear, pole Strach), verkita de la pol-usona historiisto-sociologo Jan Tomasz Gross, montris tiun dilemon klare. La aŭditorio Audimax de la Krakova Universitato preskaŭ krevis pro pleneco de scivolemaj homoj, kiam Gross elpaŝis en la ĉeesto de Adam Michnik, ĉefredaktoro de la maldekstre liberala *Gazeta Wyborcza*.

Katolika eklezio protestas

Eble la plej krudan reagon lanĉis tiu katolika eklezio mem: Kardinalo *Stanisław Dziwisz*, ĉefepiskopo de Krakovo, sendis mesaĝon al la adreso de la eldonejo *Znak*, en kiu li plendis, ke la aperigo de la pola traduko de *Timo* vekus la malnovajn demonojn de la kontraŭpolismo kaj antisemitismo. Prefere oni diskonigu la „veron pri la pasinteco“. Kaj por emfazi sian proteston kontraŭ la hereza verko, la altranga ekleziulo, kiu argumentas el la angulo de la konservativa naciisma skolo, rapidis por bloki ajnan publikan ekdiskuton pri la temo. Ŝajnas ke la pola eklezio posedas alian veron ol Gross. Al la ĝenerala kolero el tiuj rondoj aliĝis la paraklerikala Ligo de polaj familioj, kiu sugestis, ke la skandal-verkisto estu forpelita de la lando, tra kiu li vojaĝis komence de 2008 por prezenti sian libron kaj publike diskutigi la kontestatan temon. Kaj, eble kulmine en la ĉaskampanjo kontraŭ Gross, la ŝtatprokuroro en Krakovo ricevis la peton, surbaze de daŭre valida leĝo el la Kaczyński-tempo pri ofendo kontraŭ la pola nacio, ekzameni la aferon. Sed tiu instanco ne povis malkovri ion kriman en la libro de Gross. La gazeto *Rzeczpospolita* kunludis la melodion de la ĥoro kontraŭ sia ekssamlandano. Unu el la gvidaj polaj ekleziuloj, kiuj tamen montris komprenon por la intenco de Gross, estis rekta kolego de Dziwisz: nome *Józef M. Życiński*, ĉefepiskopo de Lublino. Laŭ li libroj estas verkitaj, por ke ili estu diskutataj, eĉ se temas pri tiom tikla temo kiel la antisemitismo en Pollando.

Jam la anglalingva originalo de *Timo*, aperinta en 2006, eksplodigis en Pollando lavangon de protesto kaj ondon de ĉagreno. Unuavice la libro ja celis fermi scio-truon ĉe la usona publiko, kie eĉ intelektuloj estas malbone informitaj pri la postmilita antisemitismo en Pollando, en kiu ankaŭ poloj envolviĝis en la mortigo de judaj enloĝantoj. Nun *Znak* aŭdacis publikigi la polan tradukon (tamen sen inkluzivi la klarigan enkondukon) ĝuste por diskonigi la veron, kiel pretendas *Henry Wozniakowski*, la estro de la eldonejo, kiu cetere estas katolika.

Cetere Gross ne estas novulo inter tiuj, kiuj traktas la fenomenon de la antisemitismo en Pollando. En 2000 aperis lia libro *Najbaroj*, en kiu li verkis pri la masakro de Jedwabne, kiam en somero 1941 centoj da judoj estis fajre murditaj de siaj polaj najbaroj. Tio estis ŝokego, kaj Jedwabne fariĝis kolektiva traŭmato, kiel cetere ankaŭ la mortpafo de miloj da polaj oficistoj kaj civiluloj far NKVD¹ en arbaro ĉe Katyn komence de 1940. Sed tio estas alia historio.

Do la historio en Pollando reage al la nova libro de Gross evidente nek surprizis, nek impresis la scienciston el Usono, kiu, naskita en 1947, mem estas juddevena kaj en 1968 (!) forlasis Pollandon post antisemitisma kampanjo organizita de Mieczysław Moczar kontraŭ la liberala juda inteligencio. En 1969 Gross elmigris al Ameriko, kie li fariĝis docento pri sociologio, historio kaj politikaj sciencoj en diversaj universitatoj (Yale, Princeton, Novjorko).

Kielce 1946

Kiuj do estas la gvidaj traktaĵoj kaj kernaj hipotezoj en la libro *Timo* ? En ĉapitro 1 la aŭtoro donas superrigardon pri la historia kunteksto de la lando, kiu estis ĵus liberigita de la nacisocialisma okupado kaj transiris al la komunisma regado. Kiel montras ĉapitro 2, la judojn, revenintajn el koncentrejoj kaj el la sovetia ekzilo, subite trafis akra ondo de kontraŭstaro, abomeno, rifuzo precipe flanke de la kontraŭuloj de la komunistoj! La malamo kulminis, kiel montrate en ĉapitro 3, en la pogromo de la 4a de julio 1946, kiam en la urbo Kielce estis agresitaj 42 judoj, kiuj pereis. Aliaj judoj estis murditaj en trajnoj de kaj al Kielce kaj en stacidomoj. Ĉapitro 4 traktas la reagojn je la kontraŭjuda perforto, ĉapitro 5 temas pri la socia distanco inter judoj kaj ceteraj etnoj, kaj en la plej lasta ĉapitro 6 Gross analizas la kliŝon de la „juda bolŝevismo” kaj la involvigon de judoj en komunismaj faroj en Pollando kaj orienta Eŭropo. Do estas klare, ke tiu „ŝtofo” estas sufiĉe eksplodema.

Utiligante por sia studo vastan aktaron kaj raportaron de atestantoj, Gross ekspluatis ankaŭ la ĉi-koncernan publicistikon. En tio Gross pentras impresan bildon de kondiĉoj karakterizitaj de vasta antisemitismo kaj ekstreme kontraŭjuda sinteno unuavice en la gvidinstancoj de la pola katolika eklezio; due li montras la mankantan intereson flanke de la komunismaj regantoj por protekti la judajn civitanojn. Tiel Gross kontraŭargumentas la hipotezon de *Marek Jan Chodakiewicz*, kiu en sia libro *Post la Holokaŭsto* (2003) klopodis mildigi la malbonan reputacion de etnaj poloj rilate la antisemitismon, emfazante, ke la kontraŭjudaj atakoj havis sian radikon unuavice en la kontraŭkomunisma sinteno, malpli en la kontraŭjuda instigo mem. Sed Gross asertas fakte la inverson. Cetere historiistoj substrekis la fakton, ke 30 procentoj de la membroj de la komunisma politika aparato en Pollando estis de juda deveno, kaj tiuj funkciuloj pli gardis la interesojn de la komunistoj ol tiuj de siaj minacataj samgentanoj. Do ĉar multaj judoj mem fariĝis kunlaborantoj de la ŝtata subprema aparato, la judoj aŭtomate – kaj unuafoje – fariĝis politikaj malamikoj, kiel atentigas publicisto *Andrzej Madela*. Kiel Gross klarigis la cinikan ludon de la potenculoj en intervjuo kun la revuo *Spiegel* en januaro 2008, la komunismaj aŭtoritatoj entreprenis nenion por protekti persekutatajn kaj batatajn judojn, havante ambivalentan rilaton al la antisemitismo. La komunistoj bone sciis, ke antisemitismo estas disvastigata, sed ili ignoris la problemon, ĉar ideologie ĝi ne kongruis kun la marksisma doktrino. Antisemitismo do estis socia tabuo, supozeble ĝis nun. Aliflanke, la partiaj gvidantoj timis veki la impreson, ke la komunistoj defendas la judojn. El la vidpunkto de la radikala naciisma opozicio pogromoj al judaj komunistaj funkciuloj validis kiel kontribuoj al la liberiĝo de la fremdregado, murdoj ricevis la signifon de heroaj patriotaj agoj.

Trian interpretan varianton, iusence neŭtralan, kolportis la Instituto de Nacia Memoro (IPN) en Varsovio, laŭ kiu la murdoj al la suferantoj de la holokaŭsto ne okazis unuavice pro la motivo de la antisemitismo mem, sed pro la ĝenerala „morala dekadenco“ de la socio tuj post la dua mondmilito. Oni taksas, ke en postmilita Pollando ĉirkaŭ 1500-2000 holokaŭst-postvivantoj trovis la morton pro pogromoj, kaj ke entute ĉirkaŭ 200 000* animoj forlasis Pollandon por fuĝi de la ilin atingonta teroro. Inter ili troviĝis ankaŭ juddevenaj esperantistoj (ekzemple Isaj Dratwer).

Kompleksa historio

La historia vero estas tamen iom pli kompleksa: En la kolektiva memoro de poloj restis la imago pri la judoj, kiuj esprimis antaŭmilita simpatio por Sovetunio kaj ne kontraŭis la invadon de la Ruĝa Armeo en Orienta Pollando en septembro 1939 por esti je ĝia flanko kaj por forpeli, persekuti kaj detrui polojn en la jaroj de la sovetia teroro. Alia komplekseco koncernas la fenomenon de la „viktima konkurenco“, priskribita de la publicisto *Czesław Bielecki*. Poloj ja konsciataj pri sia propra ne malgranda viktimeco dum la nacisocialisma okupado, forgesus konsideri, ke la genocido ĉe la judoj multe superis la viktimojn ĉe la kristanaj poloj. Kaj *Jakub Kłock-Konkolowicz* klarigis, ke multaj poloj simple ne povus akcepti, ke apud la bildo pri la viktimoj en la propraj vicoj ekzistis ankaŭ la bildo pri la polaj kulpantoj. Gross do celas kontribui al la detruo de la mitoj pri la ekskluziva pola viktimeco kaj de la unika pola partizano aŭ heroo.

Siatempo nur unusola episkopo, *Teodor Kubin* el Ĉenstoŭovo, kuraĝis kondamni la kruelan incidenton en Kielce, post kiam disvastiĝis la onidiro pri rituala murdo al kristana knabo, por ke judoj povu baki macojn el lia sango. Aliflanke, esprimas *August Hlond* kaj eksepiskopo *Stefan Wyszyński* silentis, laŭ bona tradicio de Vatikano rilate la judan demandon, eĉ kiam en 1946 juda delegacio petis lian helpon. Ĝuste ĝian silentemon pri la traktataj eventoj kaj la principon de pasiveco Gross riproĉas al la pola eklezio. Ĝis hodiaŭ flanke de katolikaj ekleziuloj kaj de IPN ekzistas la suspekto, ke la komunisma sekreta servo „organizis“ la pogromon en Kielce, por deflankigi la mondon de la atento pri la tiam manipolitaj politikaj balotoj. La pruvo pri tiu hipotezo ne ekzistas. Gross mem supozas, ke la ekscesantoj timis, ke la revenantaj judoj povus repostuli la posedaĵojn, kiuj estis konfiskitaj kaj perforte alproprigitaj de aliaj dum la nacisocialisma okupado. La aŭtoro krome asertas, ke multaj poloj eĉ ŝatis observi la holokaŭston por materie profiti el la detruo de juda ekzisto. Tiel li celas pruvi, ke la poloj estus ludintaj gravan rolon en la likvido de la juda popolo, cetere ne sen sento de honto pri la juda tragedio okazinta en sia lando. Baze, Gross celas respondeci la polan socion kolektive pri tio kio okazis kun la judoj post la 8a de majo 1945 en Kielce kaj aliloke en Pollando, kaj devigi ĝin psike kaj materie okupiĝi prie.

Judaro reviviĝas en Pollando

Inter la intelektuloj, kiuj aktive observas la renaskiĝon de la juda(j) komunumo(j) en Pollando ĉefe post 1989, *Konstanty Gebert*, eksa ĉefredaktoro de la juda revuo *Midrasz*, atentigas, ke tiu(j) komunumo(j) ampleksas ĉirkaŭ 25 000 anojn, kun kreskanta tendenco. La kaŭzo de tiu cifero ne estas enmigrado aŭ demografia

eksplodo. En Pollando vivas pli kaj pli da posteuloj de judoj, postvivintaj la militon, kiuj restis en Pollando kaj antaŭ du-tri generacioj rezignis pri sia judeco. Tiuj asimilitaj judoj nun intencas kaj klopodas remalkovri siajn originajn radikojn. Tio eblas precipe post la fino de la komunismo, kiam ne plu ekzistas kialo timi sian judecon. Gebert notas, ke post 1989 praktike forestis antisemitaj elpaŝoj de dekstremaj grupigoj (kun raraj esceptoj ekzemple flanke de skinhedoj)**. La eklezio klopodis, eĉ se malvolonte kaj eble ne sincere, retropuŝi la antisemitismon en siaj propaj vicoj, kaj la pola prezidinto *Lech Wałęsa* petis pardonon en la israela parlamento (Knesset) pro la malamikeco de la poloj vidalvide de la judoj en la pasinteco. Okaze de la 50a datreveno de la pogromo en Kielce, do en 1996, la ĉefministro publike montris penton. Ĉiuj registaroj post 1989 emfazis, ke ili volas akcepti la etnan kaj kulturen diversecon. La katolika eklezio eĉ publikigis pastoralan leteron, en kiu antisemitismo estis kondamnita kiel nekristana sinteno. Kiel konate, *Karol Józef Wojtyła* alias papo Johano Paulo II kaj dum jardekoj en sia rolo kiel spiritus rector de katolika Pollando multe klopodis por la repaciĝo kun la judaro. La leĝo, kiu regulas la rilatojn inter pola ŝtato kaj judaj komunumoj, garantias al judoj, ke ili rajtas foresti de sia laborloko okaze de juda festotago (ĉar la nombro de judaj festotagoj estas pli alta ol tiu de katolikaj, aperis onidiroj, ke judoj ĝuus privilegiojn !). La diplomaciaj rilatoj inter Pollando kaj Israelo estas normalaj, ekstera komerco kaj turismo prosperas. Sola grava problemo estas la rehavigo de juda posedaĵo.

Enketoj montras, ke tamen kreskas samtempe kaj antisemitismo kaj ĝia rifuzado (Gebert montras ciferojn). Antisemitismo ekzistas en ĉiuj tavoloj de la loĝantaro, sed junaj urbaj loĝantoj kun pli alta lerneja klero rifuzas ĝin. Tio implicas, ke oni povas esperi, ke antisemitismo estas reduktiĝanta fenomeno. Samtempe kreskas ankaŭ la interesiĝo pri judaj temoj, konstatas Gebert, kiu cetere fondis, fine de la 70aj, la Judan Flugantan Universitaton. Eĉ se la judoj en Pollando daŭre ne estas tiom ŝatataj***, la ksenofobio direktas sin nuntempe pli forte kontraŭ poloj el Ukrainio kaj kontraŭ romaoj (ciganoj), kiuj suferus pro la ĉiutaga diskriminacio. Tiel Pollando fariĝis tute normala eŭropa ŝtato kiel ekzemple Svislando kun sia nova kaj malnova ksenofobio kontraŭ „balkananoj“, germanoj ktp.

Interesiĝo apud indiferenteco

Dum la popolamaso evidente restas indiferenta al similaj provokaj temoj starigataj de Gross, kritiko atingis la libron ĝis nun sole flanke de kelkaj interesataj intelektuloj. Por iuj kritikistoj la radikala tono aplikita en la libro de Gross kaj lia ĝenerala riproĉo al la etnaj poloj, ke ili celis „etnan purigadon“ kaj volis finfari la holokaŭston, estas tro da spico. Krom la agresema nescienca stilo ne plaĉis la laŭdire arbitra elekto de fontoj, la nesufiĉa historia prilaborado, la simplaj ĝeneraligoj, la ekstremaj pritaksoj kaj la dubindaj, eĉ fiaskintaj interpretoj (historiisto *Dariusz Stola*), sed ankaŭ la malekzaktecigo de datoj kaj faktoj kaj la manipolataj citaĵoj cele al la pravigo de la intence unuflankecaj asertoj. Tial diversaj kritikantoj de la libro estas skeptikaj pri la epistemologia valoro de la verko kaj dubas, ĉu ĝi kapablos konduki al konstruiva diskuto. La historiisto *Andrzej Paczkowski* konsideras la aŭtoron de la libro ĝeneraliga misiisto. *Andrzej Madela* eĉ imputis al Gross, ke li falsigis la realecon. La direktoro de IPN, *Janusz Kurtyka*, nomis la aŭtoron eĉ „vampiro de la historiografio“, ĉar lia libro havus nur malmulton komunan kun serioza scienca laboro.

Bedaŭrinde la libro de Gross, kiu tamen trovis sufiĉe vastan disvastiĝon ankaŭ en Pollando, evidente ankoraŭ ne tute sukcesis rompi la tabuojn, kio eble estus ĝia ĉefa merito. La honesta prilaborado de la tikla historio, precipe se ĝi malfavore parolas pri poloj kaj katolikoj, ne apartenas al la ,nacia sporto' praktikata en Pollando. En socioj, kie tradiciaj moralaj, etnaj kaj religiaj antaŭjuĝoj ankoraŭ estas fortaj, tia intenco estas preskaŭ senespera. La sama hezitemo kritike okupiĝi pri sia pasinteco validas ankaŭ flanke de iuj gvidintoj de Pola Esperanto-Asocio, kiuj ludis signifan rolon dum la komunismo, kiel montris la ĝisnunaj observoj kaj spertoj.

Gross, kiu apogis elde Usono publicistike la laboron de KOR² kaj Solidareco³, diris al la israela gazeto *Ha'aretz*, ke li ne akceptas la klopodojn kalumnii lin antaŭ la juĝejo, kaj minacis, ke li alportos, se necese, atestantojn, judajn kaj polajn, kiuj ekzakte klarigos la eventojn en postmilita Pollando. La skandalo estus ne prikalkulebla.

Oni vidos, kiu venkos: Ĉu Gross kun sia atesto pri la historia vero, aŭ ĉu liaj kontraŭantoj, kiuj postulas, ke oni tamen trovu ĝin. Gross estas optimisma, ke la diskuto pri antisemitismo tamen ne estos malhelpata en Pollando kaj ke ĝi pli malpli frue skuos la landon: dekmiloj da ekzempleroj de la libro estas venditaj, do la intereso estas grandega. Favore por la klopodoj de Gross estas, ke naciismaj fortoj nuntempe ne dominas la ĉefan politikon en Pollando, ke Jarosław Kaczyński estas for kiel premiero, ke ultraradikalaj partioj kiel Ligo de polaj familioj maltrafis la elekton al la parlamento kaj ke la dubinda stacio Radio Maryja evidente estas perdanta sian influon. Ankaŭ en la katolika eklezio ekzistas pensemaj homoj, kiuj celas la senstreĉiĝon kun la judoj, da kiuj en Pollando ĉiukaze restis ja nur malmultaj relative al la plurdekmiliona tuto de la pola popolo.

Ŝajnas do, ke la nova situacio, en kiu Pollando troviĝas, la *antisemitismo sen judoj* estas praktikata paradokso. Iamaj polaj judoj do fariĝis asimilitaj judaj poloj. Principe eblas konkludi, ke la juda demando en Pollando ne plu ekzistas aŭ ne plu havas ekzistorajton, kvazaŭ ĝi estus solvita. Sekve, antisemitismo, kiu ja ne estas forviŝita, sed kiu perdis sian sencon, ne plu necesas en Pollando, sed ja gravas la intelekta okupiĝado pri ĝi, ne nur en eburturaj akademiaj rondoj, pro preventaj kialoj. Almenaŭ tiom longe ke sonas la voko: „Judoj atakas nin! Ni devas defendi nin !“, kiel okazinte ekzemple el la jezuita basiliko de Krakovo.

Andreas Künzli

Notoj kaj klarigoj:

* Oni taksas, ke inter 1941 kaj 1945 pereis entute 6 milionoj da judoj. Pri la nombro de postvivintaj judoj en Pollando post la dua mondmilito ekzistas diversaj ciferoj. En sia libro *Eŭropo sen judoj* (1999) Bernard Wasserstein indikas, ke en 1937 en Pollando vivis 3 250 000 judoj (laŭ W. Bartoszewski estis 3 474 000 je 1.9.1929, do 10% de la PL-loĝantaro) , en 1946 restis 215 000, en 1967 restis 21 000 kaj en 1999 5000. En sia libro pri la judoj kaj antisemitismo en la komunistaj landoj (1960) François Fejtö

menciis, surbaze de indikoj el Pollando kaj Israelo, la ciferon 40 000 kiel postvivantoj en Pollando. Laŭ la indikoj de Konstanty Gebert, ĉirkaŭ 120 000 de la 250 000 judoj, kiuj postvivis la duan mondmiliton, iom post iom elmigradis el Pollando, ĝis kiam en 1949 la elmigrado fariĝis neebla. Ĝi ree estis permesata en 1956, kiam pliaj 50 000 personoj kaptis la okazon por forveturi. Sekve al la kontraŭjuda kampanjo en 1968 Pollandon denove forlasis 24-25 000 judoj. Tiuj judoj, kiuj restis, intencis resti kiel poloj kaj asimiliĝis. Tiel okazis, ke la oficialaj judaj asocioj registris ĝis antaŭnelonge ne pli ol 6000 membrojn. La plimulton de la judoj, kiuj estas konataj al Gebert, ne apartenas al organizaĵoj, kion supozeble kaŭzas aŭ ilia asimiliĝo aŭ la timo malkaŝi sian identecon. Iuj simple ne deziras esti registritaj sur iuj judaj listoj. Do la judaj tradicioj rekomenciĝas prosperi ekster tiuj oficialaj organizaĵoj. Informoj ĉerpitaj el: Konstanty Gebert: Eine unerwartete Wiedergeburt – Judentum in Polen [Neatendata renaskiĝo – judoj en Pollando]. En: Brigitte Ungar-Klein (Hg.): Jüdische Gemeinden in Europa zwischen Aufbruch und Kontinuität [Judaj komunumoj en Eŭropo inter ekirado kaj kontinueco]. Eldonejo Picus en Vieno, 2000.

Eĉ se ekzaktaj ciferoj pri judoj en Pollando ne ekzistas, oni supozas, ke en la jaro 2000 ekzistis 8000-12 000 judoj, de kiuj la plimulto vivas en Varsovio, Vroclavo kaj Bielsko-Biała. Laŭ indikoj de Moses Schorr Centro la nombro estas verŝajne pli alta, ĉar multaj judoj en Pollando ne praktikas religion. Do la centro supozas la ekziston de ĝis 100 000 judoj en Pollando, inter kiuj 20-40 000 aŭ havas rektan ligon al sia juda komunumo, aŭ estas religie aŭ kulture ligita al judeco.

** Laŭ indikoj de la Koordina Forumo kontraŭ antisemitismo, inter januaro 2001 kaj novembro 2005 okazis 18 antisemitismaj incidentoj. La duono havis propagandan karakteron, 8 kazoj estis ligita kun perforto (vandalismo, profanoj, buŝa misuzo). Antisemitaj incidentoj per armiloj ne okazis.

*** Laŭ enketo de CBOS (Centrum Badań Opinii Społecznej) publikigita en januaro 2005 pri la sinteno vidalvide de aliaj etnoj en Pollando, 45 % de la enketitoj esprimis malsimpation vidalvide de la judoj, 18 % simpation kaj 29 % estis indiferentaj (8 % sendecidaj).

¹ NKVD: Narodnyj Kommissariat Vnutrennykh Del (Popolkomisariato pri internaj aferoj), organizis la ŝtatan teroron en Sovetunio dum 1934-1946.

² KOR: Komitet Obrony Robotników (Komitato por la Defendo de la Laboristoj), fondita en 1976 de polaj intelektuloj cele al la apogo de la sendependa sindikato.

³ Solidareco: pole Solidarność, pola sindikata movado, kiu estiĝis en 1980 el la strika movado kaj kiu esence influis la politikan evoluon en Pollando, kondukante al la politika turniĝo en 1989.

La libro:

Jan Tomasz Gross. Strach. Antysemityzm w Polsce tuż po wojnie. Historia moralnej zapaści", ZNAK Kraków 2008

Jan Tomasz Gross. Fear. Anti-Semitism in Poland after Auschwitz: An Essay in Historical Interpretation. Random House 2006.